



PENSEO

N-ro 366

apr. / 2022

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Tiberio Madonna (Italio)



LA ORFAJ VORTOJ

Dediĉita al Paulo Silas

La literoj
formis silabojn
la silaboj
konstruis vortojn
la vortoj
komponis versojn
la versoj
naskis poemojn.

La poemoj
plenigis paĝojn
la paĝoj
produktis kajerojn
revuojn librojn
elektronikajn retejojn
en kiuj
la skribitaj vortoj
dancis kune
dancis konsente
por esprimi la mondon
tra viaj okuloj
por rakonti la trajnon
de viaj pensoj.

Ili vojaĝis
de leganto al alia
por disvastigi
ĉiun emocion
kiu eskapis
el vi.

Ili kuradis
portante tra l' landoj
ĉiun senton
de sia patro
dirante al la mil
mondaj strandoj
vian doloron
vian koleron.

Kaj la vortoj multiĝis
skribataj senĉese
de l' fekundaj fingroj
de via mano
kiuj
neniam lacaj
faris kaj diris
produktis kaj naskis
disŝutis la fruktojn
de via pensado
kaj dissemis ĉirkaŭen
viajn filojn
viajn parolemajn
signifajn filojn:
la vortojn spontanajn
de viaj poemoj.

Vi verkis
kaj verkadis
kaj pluaj vortoj
atendis naskiĝi.
Sed nun
abrupte
ĉio interrompiĝas
kaj finiĝas.

Kial?

La vortoj jam skribitaj
 atendis la naskiĝon
 de siaj fratoj
 atendis pluan paroladon
 de sia patro
 por daŭrigi doni voĉon
 al vi
 kune kun la novaj.

Kontraŭe
 la halto subita
 disverŝas la nokton
 kaj estingas la fajron.

Kaj nun
 la orfaj vortoj
 krias en la frosto
 kiu ilin premezas
 krias al la aero
 kiu ilin sufokas
 krias al siaj fratoj
 kiuj neniam naskiĝis
 krias al sia patro
 kiu ne plu estas.

La vortoj de l' poemoj
 sen sia kreinto
 malesperas kaj ne komprenas
 kial.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



DIVERSECO

Kiam poeto muzikas,
 per la unika liriko,
 jen poetin', kiu stelas
 en la beletra ĉielo.

Nur necesas tenereco;
 for la leksika patrol'!
 Simple akceptu la vorton
 poetino, sen cenzuro!

Juiz de Fora, 23/02/2022.

Al virinoj

En ĉiu virin' enestas,
 Biblia sanktulino:
 fratinoj Maria kaj Marta,
 el Betania familio;
 Maria, el Magdala,
 Maria, el Nazareto.

El Marta, prizorgo aktiva,
 kaj el Maria, adorado
 al tiu Gasto subluma;
 kaj la pordo de elaĉeto,
 el Madalena ĉarmplena.

Kaj en ĉiuj patrinoj, mi vidas
 la gracon de la plej nobla,
 sanktejo de l' enkarniĝo
 de Kristo, Filo de Dio.

Juiz de Fora, 07/03/2021.

Gravedeco

Ĉiumonate venas luno
 nuda, graveda je lumo
 por sin bani en la maro
 per la lunlumo sorĉita.

Sed ravo fariĝas ploro
 pensanta pri la milito:
 kio al beboj okazos
 de surogataj patrinoj,
 kaŝitaj de la bombadoj
 en la keloj de Kiev?

Juiz de Fora, 18/03/2022.

Liven Dek (Hispanio)



Sola sub la steloj

(Kantoteksto)

Sola en la nokto,

meze de kamparo,
 paŝas infaneto
 plorante kun amaro.
 Portas liajn ĝemojn
 eta milda vento.
 Super li, la steloj
 brilas en silento.
 Larmoj sen demando,
 ĝemoj sen respondo,
 li ne scias kie
 restis lia mondo.
 Eta pupo estis
 lia lasta ĝoj',
 sed ĝi malaperis
 ie sur la voj'.

*

Sola sub la steloj,
 meze de kamparo,
 paŝas infaneto
 plorante kun amaro.
 Ne plu estas hejmo,
 bombo rompĉin ĝin,
 malaperis muroj,
 frato kaj fratin'.

Larmoj sen demando,
 ĝemoj sen respondo,
 li ne scias kie
 restis lia mondo.
 Foren el la strato,
 Paĉjon oni trenis,
 faris lin soldato,
 kiu ne revenis.

Larmoj sen demando,
 ĝemoj sen respondo,
 sub la steloj iras
 eta vagabondo.
 Ie sur la vojo,
 aŭ ĉe la landlim',
 perdis li la pupon,
 falis la patrin'.

*la legantoj de Penseo povos aŭskulti la belan melodion
 komponitan de Feri Floro: https://youtu.be/ekD-r_6yBh4*



Moissej Bronshteyn (Rusio)



La suno helbluan ĉielon prilumas kontente.
 Ja ankaŭ al mi sian belon donacas portempe
 la panjo-naturo eĉ en tiu tempo kruela,
 por ke mi memoru, ke tamen la mond' estas
 bela.

Sed penso trudema la cerbon aflikte ekboras:
 — Nun brulas milito en for', ĉu vi tion
 memoras?

Imagu vi l'sangajn batalojn kun ĝemo kaj
 tondro,

konjektu, ke ja ne por ĉiuj nun belas la mondo.
 Mi tute ne kulpas pri tio, sed kulpon mi sentas,
 ĉar estas ja vi, mia land', kiu ne plu prudentas,
 kaj ne plu honeste distingas malbonon kaj
 bonon.

Mi estas senkulpa. Sed tamen mi petas
 pardonon.

*

Amiĉjo Miĉjo, mi sen superstiĉo
 konkludu nun, ĉe via jubileo,
 ke l' konatiĝo estis ja feliĉo,
 l'unua paŝo al komuna kreo
 de kantoj, de tradukoj, de kunvenoj,
 plezuraj, esperinde, eĉ sendube.
 Mi ŝatus do, ke la fortunaj benoj
 prilumu vian vivon plu sennube,
 ke saĝaj, sanaj kresku la infanoj,
 ke vian domon preterflugu plagoj,
 ne manku panoj, realiĝu planoj,
 sufiĉu pagoj por senzorgaj tagoj.
 Kaj malgraŭ la milito, la kovido
 mi levas glason, eĉ se kun mantremo,
 revante pri rekanto kaj revido, —
 kaj tenas manon preta por manpremo.



Ángel Arquillos (Hispanio)



Via foriro

Vi foriris.
Mi estos via sekreto,
mi englutos la doloron,
mi kaŝos
mian timon,
mi brakumos mian ombron,
ĉar mi simple havas tion.

Marzena Wawrzyczkova (Pollando)

L'ordono venis, ke ni nomu
nun la militon "operaco",
sed ĉiu ajn prudenta homo
l'ordonon sendas tuj al fingro.
Se rotaci' de l' diabla ringo
vertiĝon kaŭzas ĝis ekvomo,
do venu punkto, sed ne komo –
tio signifas: – Venu paco!

**

Aminoj, en la tagoj tre kruelaj
memoru, ke vi restas ja virinoj –
do restu logaj, lindaj, ĉarmaj, belaj –
kun la esper', ke trajtoj ĉi obstinaj
vin helpas la fadenojn mondajn ligi,
rompitajn nun pro l' frenezula ago,
pacigi, esperigi kaj beligi
la vivmedion de l' venonta tago.

Yohanes Manhitu (Indonezio)



En la pluvo

Mia belulino, kien vi iras?
Rigardu! La ĉielo ploras
kaj ĝiaj puraj larmoj
lavas la vilaĝvojon.
En la pluvo estas beno:
ĉiuj plantoj ĝojas
kaj la putoj estas plenaj.
El larmoj mi revenigos vin.

Tradukita de la aŭtoro mem el sia angla
poemo "In the Rain" (decembre 2007)

Yogyakarta, 18an de oktobro 2020

Se vi min amas

"Se vi min amas,
amu mian hundon!"
"Se vi min amas,
amu la maron!"
Laŭdire kiam vi amas,
amu kiel blindulo
ĉar la amo estas blinda
kaj devas esti nekondiĉa.
Sed mi ne estas anĝelo,
nur homo sub la ĉielo,
kie ankoraŭ estas kondiĉoj
en multaj surteraj aferoj.

Noemuti-Timoro, januare 2010

Jadranka Miric (Serbio)



Memore al Tago de mortintoj

Estis tago dediĉita al mortintoj.
Vintras. Iomete aperis suno
alnomata "suno-akro denta"
kiuj tre pinĉadas vin por viaj vangoj.

Sur la tombon estis metita
bukedo da freŝaj flavaj narcisoj
kaj blankaj rozoj, viaj favorataj floroj,
kiuj kreskas en ĉirkaŭaĵo de l' vilaĝo
Prlita.

Mi staris tute sola
kun koro tre dolora ,
kun animo vere trista
mute deklamis evangelion laŭ Ĥrista.

Larmoj pleniĝis la okuloj.
Unu ruliĝis laŭvange
falas al la flamanta kandelo proksimen ,
kvazaŭ adiaŭas mi de vi – ĉielaj

povruloj!

Reveis mi hejmen. Interne de la domo
meze de la tagĉambro kiel kutime
el kameno kraketadis fajro.
Surface de ĝi ruĝiĝis la granda pomo.

Sur la ronda tablo
kuŝis la blanka tuko.
Sur ĝi ligna azeno kvazaŭ estus el infana
fablo.
Sur ĝia dorso plado kun pomokuko.

La murhorloĝo ritme tiktakis.
La strataj lumigiloj eklumis
donante lumon en la ĉambro malhela.
Luno salutas min. “ne estu malgaja,
amikino bela.”

Vintra magio

La ĉielo hela bluiĝas.
Antaŭ vico de la popoloj
la posttagmeza suno oriĝas
dronanta en la profundan riveron .

Vintre rivero malvarmas.
Surface la putrantaj branĉetoj flosas,
sur kiuj lacaj birdetoj provas
laŭlonge de la rivero veli.. .

De surborde la turtokveroj koncertas
Sonoj venas de la poplobranĉar'. La suno
subiras.

Tra la duonnuda branĉar' ĝi penetras
sunobrilon .Poste en viaj okuloj ĝi
reflektiĝas.

Montara vilaĝo

Frostiĝis tero.
Krudas grundo seka.
Ho, homo pia aŭ peka.
Ŝanĝas vetero.

Malantaŭ montar'
kaŝis sin suno,
nur fojfoje brilo tra arbar'.
Penetras lumo.

Ĉe piedo montara
dometoj disjetitaj
en la distanco granda
preĝej' kaj lerne' konstruitaj.

Ĉiu knabo el la valo
sonĝas bonŝance konkeri monton.
Ĉiu trejnigas sin bonege ekipita ,
tenas flagon kaj lepor' amuleton laŭrita.

Elena Popova (Bulgario)



Ĉielarko por li

Se iu vin petas,
helpu al li kviete.
Li – branĉet' rompita
pro venteg' subita.
Lia anim' ĝemas
kaj vivi malemas...
Kaj la birdo vundita
al la homoj venas.
Etendu al li manon,
donu akvon, panon!
Donacon al li donu –
ĉielarkon kaj vojon!
Li kun fortoj novaj
ekstaros denove.

Vintra vento

Vintra vento
infan' petolema,
emas fajfi
preter la arboj.
Hodiaŭ ĝi grimpis
sur la pintojn
kaj ilin ornamis

per neĝaj steletoj.
 Kun la arboj por ludi
 alvenis la vento,
 sed ne komprenis
 ilian silenton.
 Dormas la arboj
 fortojn akumulas,
 dum blankaj revoj
 sonĝe luliĝas.

Bondeziro

Kiel juna arbeto
 kun manbranĉeto
 sur la Ter' vin apogu –
 por fort' kaj amo.
 Ofte dumvoje
 per vulpaj ruzoj
 oni vin allogos –
 sed ne mensogu!
 Menson de pigoj
 ne atendu! Strigo
 saĝa estu kaj
 gardu vian indon!
 La viv' estas fabelo.
 Vi – ĝia floro bela.

Rafael Alberti

Tiu Generalo

—Jen la generalo.
 Kion volas la generalo?
 —Glavon deziras la generalo.
 — Ne plu estas glavoj, generalo.
 Kion volas la generalo?
 —Ĉevalon volas la generalo.
 — Ne plu estas ĉevaloj, generalo.
 Kion volas la generalo?
 —Alian batalon volas la generalo.
 — Ne plu estas bataloj, generalo.
 Kion volas la generalo?
 —Amantinon deziras la generalo.
 — Ne plu estas amantinoj, generalo.

Kion volas la generalo?
 —Grandan barelon da vino la generalo
 deziras.
 —Ne plu estas barelo nek vino, generalo.
 Kion volas la generalo?
 —Bonan pecon da viando deziras la
 generalo.
 —Ne plu estas brutaro, generalo.
 Kion volas la generalo?
 —Manĝi herbojn, deziras la generalo.
 — Ne plu estas paŝtejoj, generalo.
 Kion volas la generalo?
 —Trinki akvon, deziras la generalo.
 —Ne plu estas akvo, Generalo.
 Kion volas la generalo?
 — Dormi sur lito deziras la generalo.
 —Ne plu estas lito aŭ dormo, generalo.
 Kion volas la generalo?
 —Perdiĝi tra la tero, deziras la generalo.
 — La tero ne plu ekzistas, generalo.
 Kion volas la generalo?
 — Morti kiel hundo la generalo deziras.
 — Ne plu estas hundoj, generalo.
 Kion volas la generalo?
 Kion volas la generalo?
 Ŝajnas, ke la generalo estas muta.
 Ŝajnas, ke la generalo ne ekzistas.
 Ŝajnas, ke la generalo mortis,
 ke jam, eĉ ne kiel hundo, la generalo
 mortis,
 ke la detruita mondo, nun sen la
 generalo,
 rekomencos, sen tiu generalo.

1965

Esperantigis



Antero Ávila (portugalo)

Sopiro al hejmvilaĝo

Ho mia hejmvilaĝo,
 Kiel belas pejzaĝo
 Kun kurba rivereto
 Kaj verda monteto!

Tie mi kantis libere,
 Kaj kreskis prospere.
 Blua ĉielo de foro,
 La tiea suno hela
 Kaj la maro de floro
 Aperas en sonĝo bela.
 Delonge ni apartas;
 Kara, kiel vi fartas?
 Mi ĉiam al vi sopiras,
 Revidi vin mi deziras.
 Pardonu min, mia kara!
 Miskompreno devu foriĝi!
 Ĉio povas bone klariĝi.
 Ni ja amas unu al alia,
 Kun sincera ardo emocia.
 Kara mia, pardonu min!
 Nenio povas disigi nin.
 Amo pli profundas ol maro,
 Ardo brilas kiel stelaro.
 Mi prezentu glason da vino
 Kun daŭra fervoro sen fino.
 Mi danke bondeziras al vi,
 Fidelo alestas ĉiam ĉe ni!

Sopiro al Herbejo

Sur la blua ĉielo malproksima,
 Resonas la pia kanto pilgrima.
 Kun brizo tra herbejo fervora,
 Ŝvebas nia rido kaj aromo flora.
 La verda herbejo kun emocio pura
 Abundas kun teritorio senmezura.
 Blankaj nuboj flosas tra la ĉielo,
 Nin beatigas la brila norda stelo.
 Apud mia eta boato tenera,
 Troviĝas via jurto somera.
 La sankta fonto fare de vi
 Vekas karan sopiron ĉe mi.

Kanto de Fraŭlino Libelo

Majo estas mirinda fervore,
 Mi precipe plezuras elkore.
 Nuboj en blua ĉielo deĵoras,
 Freŝaj floroj ĉie bonodoras.

En la ĝardena arbetaro,
 Kantas dolĉe najtingalo.
 Kantoj ĉie resonas ĥore,
 Tiel ĝojige kaj sonore.
 La luno al mia sonĝo brilas,
 Birdoj pri mia ornamo babilas.
 Rozoj floras ĉie kun bonodoro,
 Mi estas tiel ĝoja en la koro.
 Birdoj flugas ire kaj revene,
 La hirundo murmuris bene,
 Ke mi estas feliĉa fraŭlino,
 Oni aŭdas min kanti sen fino.

Elĉinigis



Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Mimoza Ahmeti



Estontaj homoj de mia planedo

Estontaj homoj de mia planedo
 Terkultivistoj, kosmonaŭtoj, raketolanĉantoj,
 mi ne scias kio,
 Kia ajn estu vi surtere aŭ en la ĉielo
 Kredu min:
 Ankaŭ inter la hieraŭuloj ekzistis tiaj kiel vi,
 Ankaŭ inter la hodiaŭuloj viajn vizaĝojn havas
 vi.

Ni, ĉiuj navigantoj de la lumo,
 Amis la ĉielon tiom forte kiom la teron,
 Eĉ pli forte ol la teron, kiel kutimas la homo
 Ami la forajn kozojn, ĉar ili foraj estas.
 Ni dormis mallonge kaj longe revis,
 Mi revis pri la peno je okuloj alkroĉitaj al vi.
 Tiom multe ni ĉiujn morgaŭajn horojn deziris
 Ĉar neniam reveninte ili en la hodiaŭon
 plenumiĝis.

Estontaj homoj de mia planedo,
 Vi neniam mankis al la tero.

Kredu min:

Ekde miloj da jaroj ĉi tie
 Ekzistis kiaj vi kaj kiaj vi ekzistas.
 Viaj realaj spegulaĵoj inter la popoloj
 moviĝas:
 Sciencistoj, fizikistoj, laboristoj kaj poetoj,
 Ĉiuj estontuloj kiuj altiri devas
 La mondon al la lumo. La mondon al la lumo.

Estontaj homoj de la nova epoko,
 Por ke kompenu la leĝon, perforton, ribelon
 Kredu min: multaj el vi alvenis sur la teron
 kiel fondintojn
 Kaj devus elteni penojn
 Kiel ĉiu kozo en la fremda cirklo.

Ni revitan havas en la spirito la belon,
 Sed neniam atingis ĝin tamen alproksimiĝis
 Neniam forgesis ĝin kvankam niaj vundoj
 brulis.

Ni estis ĝiaj navigantoj, ĝi nia fora lumturo.

Nia kapo kunfrapiĝis al la ŝtata kupolo...

Estontaj homoj de la ĉielo sen la ŝtata kupolo
 Mi ne scias kial tiom forte mi amas vin,
 Mi ne scias kial tiom forte mi amas vin.

Estas la viro

Estas la vespera vortico aŭ kiu scias kio
 Enpensiganta pri tio kio estas la viro,
 Kiel moviĝas la granda lia peno
 Sur ĉi tiu eta monda...
 Kion faras lia firmeco ĉi tiun horon,
 Kie kaj pro kio suferas la firmeco.
 Estas vespero, ĝis en la ĉambro, ĝis en la
 vestoj,
 Vespero.
 Miaj okuloj vestiĝas per la ombro de iu
 viro...
 Ekstere estas voĉoj, sed mi ilin ne aŭskultas,
 Nur la furoran ridadon, puran mi aŭskultas,
 Viran ridadon.

Estas la viro, la viro,
 Korpo pli proksime al la homo,
 Promeso, gesto, pli proksime al la vero,
 Enhavo kiun volas ke regu min
 Regante malpeze, ne mortigante.
 Nomo, amiko, ne separita kredo.

La vespero malsupras sur la tero, la steloj
 supras al la ĉielo,
 Mi pensas kio la viro estas, kio estas la
 monda subtenanto,
 Kio estas tiu korpo tra kiu fluas pene la
 tempo.

Elokupis min ĉivespere la figuro de iu viro,
 Grandigis ĝi mian spiriton, perfektigis ties
 fajnecon,
 Elfiltris la aeron de la libera pensado.

Delonge mi vagadas kun la plenigita volo,
 Kun la soifa deziro, ritmo, demando.
 Mi scias, ĉe ĉiuj viroj li sin esprimas, la
 viro,

Kvankam lia plena enkarniĝo
 Ankoraŭ ne aperis
 Ĉe la unuopa homo.

Elalbanigis



Bardhyl Selimi
 (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Hong Hao (1088-1155)

—*laŭ melodio Umefloroj en sudlando*

En malproksima nordo,
 mi en la ĉambr' de gasthotelo
 ekpensas pri la ruĝaj umefloroj.
 Ĉu jam ekfloras kelkaj en prospero?
 Sendito imperia venos el la sudo,
 ĉu li alportos umeflorojn kun prefero
 kiuj heroldas printempvenon

jen al ni korteganoj laŭ l' espero
kiel konsolon de l' imperi-regno?
Trans montoj kaj rivero
la floroj eble jame velkus ĉe ni.
Al kiu turnu mi min kun enkor-sufero
por plendi pri ĉagrenoj miaj
akumulitaj sub premado de mizero?

Ja vane mi imagas pri la bildo
en kiu la familianoj kun rideto
plukadis umeflorojn ĉe l' hejmloko.
Mi turmentitas de sopir-obsedo
kaj afliktiĝoj en rompita koro.
Kiam mi la liuton pluktras jen en tedo,
animo mia ŝajne flugus al hejmloko.
Aldone tatar-flutoj sonas en kaskedo,
nereteneble mi faligas larmojn de rankoro,
kun larmo-makulitaj vestoj sen rimedo.
Mi timas, ke mi nur atendas
venontan la spektaklon de la flor-koketo,
drinkonte kaj ĉantante versojn.
Sed kiam l' orienta vento per impeto
jen blovos, umefloroj plene velkos
kaj falos de sur branĉoj pro vent-ĵeto.

Li Chongyuan (?-?)

—*laŭ melodio Rememoro pri principido*
Je ekvid' de pompaj herboj
ekmemoras mi pri l' danda principido,
kiu longe vagas senrevene.
Ekster salikarboj etaĝdom' en sido
altas, ŝi atendas triste per rigardo
al la foro, en medito.
Pepoj de kukoloj pikas lian orelparon
kvazaŭ lia promes-perfido.
Jam proksime al krepusko
pluvo batas la pirflorojn en rapido
pli ĉargrenas ŝin en buduaro
kun riglita pordo kontraŭ pluv-humido.

Han Shizhong (1089-1151)

—*laŭ melodio Rivero plenuĝa*
Rivero Jangzi longas dekmil liojn,
sed ĝi ne povas per akv-lavo

forigi ambicion kaj aŭtun-pejzaĝon.
Ne diru, ke l' palaco imperia pli en ravo
imponas ol ĉielaj belaj konstruaĵoj.
Ni nin apogas al la ĝisĉiela longa glavo
kaj montras nian batalvolon.
Jen sur ĉevalo kun anhela bavo
ni tenas la pafarkon jam en batalema preto.
Ni ĵuras je stelaro, kun spitema bravo,
repremi la perditan regn-teritorion
por landaj unueco kaj sinsavo.

La falo de l' ĉefurbo kaŭzas,
ke hurlas tigroj, dronas la ventnub' en ploro.
Sed kiu povus koni la signifon
de dekmil-jara la rankoro?
Fidelas ni al montoj kaj riveroj
de l' regno, spite al larm-sanga la doloro.
Ĉe l' Bjan-rivero sonas flutoj
plendeme en vespera horo,
ĉar du imperiestroj ja suferas,
kaptitaj, ve, lamentas sub lungloro.
Indigne mi batrompis la te-kruĉon
kaj ĉuas, kial lun' ne zorgas kun ignoro?

Chen Yuyi (1090-1139)

—*laŭ melodio Feo ĉe rivero*

Por pasigi l' Drakboatan Feston*,
ĉantas Chu-poemojn** ni laŭtsone.
Por mi, gast' vaganta de-loko-al-loke
temp' forpasas fulme laŭsezone.
Granatflor' ne tiom ruĝas kiom
floroj sur dancista jup' surfone.
Ja neniŭ konas miajn splenojn
kaj ĉagrenojn laŭrezone.
Kantas mi ja iritite kaj kantvoĉo
eĉ kurtenojn vente levas nepardone.

Plenŝarĝita per oficaferoj,
pro grandaĝ' mi frakasiĝas plene.
Tamen mi al l' oriento
ĉiam turnas min ridetmiene.
Mi ĉijare drinkas per lastjara
same granda tas' senĝene.
Nun mi verŝas vinon en akvfluon

sub la pont' ĉagrene.
Ĉi-vespere ĝi rapide fluu
al rivero Xiangjiang ja alvene.

* *La Drak-boata Festo okazas ĉinjare je la 5-a de la 5-a monato laŭ la ĉina lunkalendaro, dum kiu oni memorfestas la patriotan poeton Qu Yuan (ĉ. 340-278 a.K.), kiu sin ĵetis en riveron pro humiligo kaj forpuŝo de perfidemaj korteganoj.*

** *Chu-poemoj estas ĝenro de poezio kreita de Qu Yuan.*

—laŭ melodio *Feo ĉe rivero*

Ni jen orgiis ĉe Wu-ponto,
bravuloj kaj herooj voĉobruie
drinkadis kaj parolis en festeno.
En nokt' sub la river' rapidis flue.
Sub ombro de maldensaj abrikotoj
mi flutis ĝis tagiĝo jen plengue.

Forpasis dudek jaroj kiel sonĝo.
Eĉ miras mi pri mia vivo sana
post multe da eventoj animskuaj.
Sur turo mi rigardas al pejzaĝo panorama
serena post pluvado longatempa.
Dum nokt' alŝvebas sufer-bana
kantvoĉo de fiŝistoj pri pasintaj
paseoj en memoro jama.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Lin Bu (967 – 1028)

La umefloro

Ĉiuj floroj falis, krom vi— vive prosperanta,
Nur al kiu ŝuldas sin la ĉarmo de l' ĝardeno.
Sur kristala akvo desegniĝas kelkaj branĉoj;
Subtila aromo ŝvebas dum krepuska sveno.
Antaŭ ol descendi, birdoj kaŝe vin rigardas;
Papilioj, se vin konus, sentus sin humile.
Sed, feliĉe, por mi eblas skandi, sen muziko
Kaj sen vino, kor-akorde al vi kaj trankvile.

Yan Shu (991 – 1055)

Implicita signifo

Supervalaj nuboj malaperis eĉ senspurre,
Ne videblas plu l' kaleŝo lake ornamita.
Korte la pifloroj falis sub lunbrilo pura;
La salikamenton blovis vent' ĉelage glita.
Ĝuste ĉe Fest' de Malvarma Nutro*, en soleco,
Mian sanon vundis la kelktaga drink' senbrida.
Volus mi leteri al ŝi, sed ne povas sendi:
Pro montkrutoj kaj riveroj estas voj' insida.

**Festo de Malvarma Nutro: la tago antaŭ Qingming aŭ Festo de Mortintoj, en kiu oni manĝis nur malvarmajn nutraĵojn.*

Zeng Gongliang (998 - 1078)

Loĝi ĉe la bonzejo en la templo Roso

Ĉirkaŭas kapkusenon nubnebulo de mil
montoj,
sub-lite vento el pinaro vala sombre kriĉas.
Por vidi kiel batas bordojn furiozaj ondoj,
rigardi la riveron tra fenestro jam sufiĉas.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-OKA

La reĝoj, kiuj abdikas la tronon

§28-01

Kiam la reĝo Yao proponis sian tronon al Xu You, tiu ĉi rifuzis akcepti ĝin. Kiam la reĝo Yao proponis sian tronon al Zizhou Zhifu, ankaŭ tiu ĉi malakceptis ĝin, dirante:

“Estus bone por mi, se mi surtroniĝus, sed mi nun

trovas min trafita de la malsano melankolio, kiu min turmentas, kaj tial mi, ricevante la kuracadon, havas nenian tempon por min okupi je la regado de la mondo.”

Regi la mondon signifas okupi la plej altan ordonpovan postenon kaj posedi la plej superan aŭtoritaton, kaj tamen li ne volis per tio ruini sian sanon, por ne paroli pri alio. Li firme sin tenis je sia principo. Sed, aliflanke, estas nur tia homo, kiu seninteresiĝas pri la regado de la mondo, meritas ke oni konfidu al li la mondon.

Kiam la reĝo Shun proponas sian tronon al Zizhou Zhibo, tiu ĉi diris:

“Mi nun trovas min trafita de la malsano melankolio, kiu min turmentas, kaj mi, ricevante la kuracadon, havas nenian tempon por min okupi je la regado de la mondo.”

Estas evidente, ke li preferis la vivon al la trono, eĉ se tiu ĉi lasta povas esti rigardata kiel la plej valora. Jen tio, per kio la homo atinginta la Taŭon distingiĝas de la homoj vulgaraj.

La reĝo Shun sin turnas al Shan Juan kun la sama propono. Shan Juan diris:

“Mi vivas en tiu ĉi vasta universo. Vintre mi kovras min per pelto; somere mi portas kanaban veston; printempe mi plugas la kampojn kaj mia korpo estas sufiĉe forta por la laboro; aŭtune mi faras rikoltadon kaj konservas la grenon. Tiamaniere mi povas min plene vivteni. Mi komencas labori ĉe la sunleviĝo kaj ekripozas ĉe la sunsubiro. Nun ke mi vivas liberan kaj senzorgan vivon inter la ĉielo kaj la tero, mi estas kontenta pri la granda plezuro, kiun mia vivo donas al mi. Pro kio do mi min embarasus per la mondo? Kiel bedaŭrinde estas, ke vi min ne komprenas!”

Kaj ankaŭ Shan Juan rifuzis akcepti la tronon. Post nelonge li foriris kaj sin retiris en la profundaĵon de la montoj. Neniu sciis pri lia loĝloko.

La reĝo Shun proponis la tronon al sia malnova amiko, terkulturisto, kiu loĝis en Shihu. La terkulturisto diris:

“Via majesto, vi certe jam faris vian plejblon. Kia penema homo vi estas!” Per tiuj ĉi frazoj li volis diri, ke la virto de Shun ankoraŭ ne atingis la perfektecon. Li do foriris de sia loĝloko kun sia edzino

portante sur la dorso siajn infanojn. Ili vivis en malproksima insuleto kaj neniam revenis.

§28-02

Taiwang Danfu, la prapatro de la dinastio Zhou, vivis en la lando Bin, kiun la barbara tribo Di ofte invadis. La Di-tribanoj rifuzis la peltojn kaj la silkaĵojn, la ĉashundojn kaj la ĉevalojn, la perlojn kaj la jadaĵojn, kiuj estis proponitaj al ili. Ĉio, kion ili deziris, estis la lando Bin.

Taiwang Danfu diris al sia popolo:

“Mi ne toleras, ke estu mortigitaj tiuj, kun kies fratoj aŭ patroj mi vivas kune. Vi ĉiuj restu ĉi tie kaj vivu pace kun la Di-tribanoj, ĉar ekzistas preskaŭ nenia diferenco, ke vi estos miaj regatoj aŭ tiuj de Di. Cetere, mi ofte aŭdas, ke oni ne devas, pro la posedo de la lando, alporti malutilon al la popolo nutrata de ĝia tero.”

Poste, sin apogante sur promenbastono Taiwang Danfu forlasis la landon Bin. Sed la tuta popolo lin sekvis, kaj li kun sia popolo atingis la piedon de la monto Qishan, kie ili fondis por si novan ĉefurbon. Taiwang Danfu ja povis esti rigardata kiel homo plej ŝatanta la vivon de la homoj.

Tiu, kiu ŝatas la vivon, kvankam riĉa li estas, ne devas vundi sian korpon por konservi la posedaĵojn; aŭ, eĉ se malriĉa, nek devas ruini sian sanon pro la materialaj profitoj. Nuntempe la homoj, kiuj okupas altan postenon kaj posedas honoran titolon, estas ĉiam obsedataj de la timo ilin perdi. Ili vidas nur la materialajn profitojn kaj riskas perdi sian vivon pro tiuj leĝeraĵoj. Kiel konfuzitaj estas la nuntempuloj!

§28-03

Dum tri sinsekvaj generacioj la homoj de la regno Yue murdis sian reĝon. Por eviti la saman sorton, la kronprinco Sou forkuris kaj sin kaŝis en la groto nomata Danxue. Sen suvereno, kiu regus super la regno, la popolo de Yue serĉadis la kronprincon, ĝis fine ili alvenis al la groto. Ĉar la kronprinco rifuzis eliri el la groto, ili ekbruligis artemiziojn kaj enventumis la fumon en la groton. La kronprinco estis devigita elgrotiĝi kaj kondukita al la reĝa kaleŝo preparita por li. Kiam li eniris en la kaleŝon, li levis la kapon al la ĉielo kaj laŭte kriis:

“Ho, la trono! Ho, la trono! Kial vi ne forlasas

min?”

Tio, kion la kronprinco malamis, estis ne la reĝeco, sed la malfeliĉo, kiu minacis trafi lin. Tia homo, kia estis la kronprinco, povas esti priskribita kiel ne volanta difekti sian vivon pro la trono. Jen kial la popolo de la regno Yue insistis pri lia reĝado.

Elĉinigris



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbio)

Naturo ĉiam venkas

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Vintras. Tre
freŝa vetero.
Avinjo Marta venis
kun neĝo sur la tero
kaj en aero!

Rigardo
el la tre varma
ĉambro al ĉiuj plaĉas.
Ekstere okulo larma .
Vintro karma.

Sur branĉoj
aro da birdoj.
La turtoj kvietiĝis.
arbokavo fariĝis
domo .Tagiĝis.

Odozas
ĉio printempe.
Naturo bonvenigas
nin sed homoj malsaĝe
ekmilitis. Ve.

La granda

Rusio vane
atentigis Eŭropon.
Provokis ili krime .
Agis malsane !

Duoblaj standardoj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Milito!!
Nek mi sukcesis
resanigi la vundojn
kiuj animon premis
kiam ĝi ekis!

Ankoraŭ
popolo mia
suferas disĵetita
ekster la domo sia.
Malgajas.Pia.

Popolo
forte batita
el domoj elpelita
per bomboj mortigita,
viva bruligita!

Trafiko
dela humaj organoj
elprenitaj en Flava
domo .Far’de albanoj.
Mutis eŭropanoj!

Ankoraŭ
homojn ni sercêas.
Malbono inter homoj
Fiuloj kolektiĝis.
Nazion festas

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*



Eldonas Redakcio de **Penseo**
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)
Retadreso: vejdo@163.com

www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm

